

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 505

NOVEMBRO 1947

Ĉiu serioza Esperantisto, ĉu komencanto, ĉu progresinto, serĉas konstantan normon pri uzo de vortoj. Post longa intertempo denove estas havebla tiu jam fama konsultilo, kun ampleksaj klarigoj kaj citaĵoj el Zamenhofaj verkoj, la Tria Eldono de

## PLENA VORTARO DE ESPERANTO

de E. Grosjean-Maupin, A. Esselin,  
S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien.

Esperanto-Esperanta.

Prezo £1 angla, afranko 9p.

Bonvolu atenti, ke ĉi tiu estas fotografa (ofseta) represo de la dua eldono, sed NE reviziita eldono. Tiu ne aperos ĝis post tre longa tempo.

---

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

---

Ni bedaŭras ke ni ne povas akcepti mendojn el landoj de kie oni ne povas sendi pagon al ni.

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.*

**La Kvakerismo** (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaĵ ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

**Rikardo Vandagnotto**, Hipólito Irigoyen 434, 3a etaĝo, Ap. B., Buenos Aires, Argentino, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

**Ne-Katolikoj**, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpagaĵe de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Christian Schilling**, Münchener Str. 22, (22c) Köln-Höhenberg, Brita Zono, Germanujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj aŭ ilustr. poŝtkartoj, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos. Bonvolu afanki filatele.

**Du Wuppertal-anoj**, 45-jaraĝaj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Bonvolu skribi al: Julius Ackermann, Marschallstr. 12, (22a) Wuppertal-Vohwinkel, Germanujo.

**Tutmondan korespondadon** per filatele afankitaj poŝtkartoj deziras Otto Schell, Boppstr. 23, (22b) Mainz, Germanujo.

**Kio estas Pensologio?** Broŝureto sendota senpagaĵe, kun folio LA VIVO TRANSFORMITA, laŭpeta al (E) Hipsley, 17 Abbot's Road, Birmingham 14, Anglando. POVO SUKCESI kontraŭ 3 i.r.k. "Traktajo rekomendinda kaj pripensinda, kun instruero bezonata en la nuna tempo!" (British Esperantist). Hipsley, kiel supre.

**Serĉas siajn korespondintojn** Hermann Wagner, iam Fürth (Bay.) nun Edelraute, (13b) Oberstdorf (Allgäu), U.S. Zono, Germanujo.

**Deziras interŝanĝi** ilustritajn poŝtkartojn kaj aliaĵojn kun la tuta mondo. Respondo garantiata. Karl Facke, (16) Somborn, Kr. Gelnhausen, U.S. Zono, Germanujo.

**Mi deziras korespondi** kaj interŝanĝi pm., pk. il., gazetojn kun gesamideanoj de la tuta mondo. Korespondas ankaŭ en angla, franca, rusa, kaj germana lingvoj. Al ĉiu mi respondos. S-ro Josef Klug, (13a) Banzenweiler 23, Kr. Feuchtwangen, U.S. Zono, Germanujo.

**Deziras korespondi** kun gesamideanoj el la tuta mondo pri ĉia temo Erik A. Anderman, Maŝmastgatan 14, Avesta, Svedujo.

**F-ino Carmen Ribeiro**, lernantino, r. Areal de Cima 19, Salvador, Est. de Bahia, Brazilo, deziras korespondi per p.k.

**Kolektistoj!** Interŝanĝu poŝtmarkojn kun James Vale, 26 Stile's Road, Clontarf, Dublin, Irlando.

**Argentino**, Buenos Aires (8), Amalia 347 (Liniers), S-ro Giordano Bruno López, p.m. k.ĉ.l., kvanto kaj valoro reciprokaj. Certe respondos.

**Fraŭlino deziras** ricevi kuirreceptojn naciajn. Interŝanĝe ŝi sendos tiajn hispanajn, poŝtmarkojn aŭ poŝtkartojn. Skribu al Manuela Gallardo, Santo Domingo 91, Badajoz, Hispanujo.

**Deziras interŝanĝi** poŝtmarkojn kaj korespondi per bildkartoj tutmonde S-ro Francisco Amorós, Milagrosa 4, Valencia, Hispanujo.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi p.m. S-ro Patenat Baró, Francisco Morell, 5, 2, Manresa (Barcelona), Hispanujo.

**Naskiĝo**. En Manresa, la 31an de Julio naskiĝis al Ge-sroj Fuset, filino nomita Maria Montserrat.

**Peter Gilles**, Burgstr. 110, (22c) Köln-Höhenberg, Brita Zono, Germanujo, deziras korespondi kun junaj gesperantistoj en la tuta mondo. Certe respondos.

**Hungara Esperantista fraŭlo**, 42-jaraĝa, ŝtatoficisto korespondadus el la tuta mondo kun Esperantistaj fraŭlinoj kaj vidvinoj. Se estus eble edziĝo mi irus ankaŭ eksterlanden. Leterojn kun fotografajo kaj naciakolora rubando sendu: Répás Rezső, Tatra tér 1, Szeged, Hungarujo.

**Rutina komercisto** rekomendas sin por perado kaj reprezentado en komercaj kaj similaj aferoj. Teknika scio kaj multaj rilatoj al diversaj industrioj. Uzu miajn servojn kaj praktikan montron por la utilo de Esperanto. Kurt Götz, Mühlenstr. 6, (24b) Büdelsdorf-Rendsburg, Brita Zono, Germanujo.

**Botŝlipa modelisto** kaj fabrikejo-administranto deziras korespondi kun sammetiistoj alilandaj. C. T. J. Birch, 107 Waterworks Road, Norwich, Anglujo.

**Argentina knabo** deziras korespondadi kun tutmondaj geknaboj. Adreso: Alberto Sabanes, 9 de Julio 1344, Venado Tuerto, Argentino.

**Korespondon kaj poŝtmarkojn** deziras interŝanĝi tutmonde Miroslav Machulka, Ĉsl. brannémoci 1, Falknov ĉe Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiata.

**Mi estas nova lernantino**; mi volas korespondi kaj interŝanĝi pk., kaj pm. kun la tuta mondo. Mi respondos al ĉiu. F-ino Drahuše Fialová, oficistino, Maly Ujezd 21, pp. Mělník, Ĉeĥoslovakujo.

**Ano de Laborista Partio** deziras korespondi kun unu serioza Esperantisto en ĉiu lando pri la regado en la lando kaj kiom ĝi rilatas al la demokrata socialismo. S-ino Hilda de Vere, Bela Monto, Wrotham, Kent, Anglujo.

**Arkitekturan Terminaron** (Azorin) volas aĉeti Paul Schwerin, 36 McDougall St., Milsons Point, N.S.W., Aŭstralio.

**Frans Degens** interŝanĝas pm. Godshuisstr. 123, Boschvoorde, Belgujo.

**Gefraŭloj celante** almigri al Nov-Zelando aŭ Aŭstralio bonvole skribu al S-ro C. Lowe, 52 Woodlands Avenue, Berkhamsted, Anglujo.

**Korespondi** kaj ilustritajn poŝtkartojn interŝanĝi kun tuta mondo deziras Old. Franc, studento, Kobylá na Morave, Ĉeĥoslovakujo. Certe respondos.

**Deziras tutmonde** interŝanĝi poŝtmarkojn, leterojn, poŝtkartojn; respondas ĉiam, S-ro Hernando, 6 Rue Bellevue, Carcassonne (Aude), Francujo.

**Mi donos poŝtmarkojn** por alt. saksofono. Mi deziras korespondadi kun: junaj fotoamatoroj de tuta mondo. Certe respondo. Afanku filatele. Skribu al Jan Jasinski, skr. poczt. 14, Pabianice, Pollando.

**Germana frizisto** serĉas korespondadon kaj interŝanĝadon de fakgazetoj kun frizistoj en la tuta mondo. Skribu al Hermann Hagenbusch, Stadtjägerstr. 23, (13b) Augsburg, Bayern, Germanujo.

**Juan Couceiro**, hispana (galicia) Esperantisto, iama maristo sur ŝipo Burstad estas serĉata de liaj parencoj. Sen sciigoj ek de 26 jaroj. Kiu scias, bonvole skribu al Del. S-ro Rodolfo Garcia, Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.

**Bildkartoj ilustritaj ĉiulandaj** po centoj estas aĉetataj por komercado. Por ofertoj kaj negoc-kondiĉoj skribu esperante, hispane, angle, portugale, itale, aŭ germane al Delegito de UEA, S-ro Rodolfo Garcia, Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.

**Italujo**. Vendas kravatojn, virinŝtrumpojn, ŝultrotukojn porsilkajn; donas ĉiuspacajn informojn, zorgas turistojn; agas kiel vojaĝagentejo; Lovati Kern, Lipari 8, Milano. Respondkuponon.

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-RO 505 (11)  
Novembro 1947

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :  
H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Cion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Cion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

## Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj  
 $\frac{1}{2}$  paĝo - 50 ŝil. anglaj  
 $\frac{1}{4}$  paĝo - 25 ŝil. anglaj  
 $\frac{1}{8}$  paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

## Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

## NIA POZICIO

Kun sentoj streĉitaj la mondo sekvis la evoluon de la interŝtataj rilatoj kaj kun ĝi la pliprofundiĝon de la abismo inter Oriento kaj Okcidento. Sub Oriento oni legu Sovet-Unio kun amikoj, kaj sub Okcidento legu la Brit-Usonan aliancon kun ties amikoj. La minacanta danĝero kunigis iam la atakitojn kaj per komuna klopodo ili sukcesis gajni la militon. Hodiaŭ oni jam povas diri kun ĉagreno, ke la venkintoj malgajnis la pacon !

Ĉi tiu konflikto, naskiĝinta el reciproka malfido, influas ĉion. Ĝi ne estas la diplomata ludaĉo, sed oratora interbatalo de du ideoj laŭvide ne kunigeblaj.

Stariĝas la demando por ni Esperantistoj, kian pozicion ni akceptu por ni en ĉi tiu ankoraŭ ideo konflikto. Ni jam akiris sperton en simila situacio. Siatempe kiam stariĝis tutecaj regadformoj en Eŭropo, iuj fervoruloj inter ni provis submetigi la Esperanto-movadon al ideoj absolute fremdaj al ĝi. Tio feliĉe ne sukcesis. El ĉi tiu sperto naskiĝis la volo fiksi nian pozicion koncerne ideologiajn fluojn, alivorte montri la konstanton en nia movado. La lingvan unuecon garantias la *Fundamento* kaj ĝin ni devas kompletigi per la ideo unueco de la movado. La nuna statuto de U.E.A. tion priatentas, kia devas esti nia sinteno antaŭ la daŭre ŝanĝiĝantaj fluoj politikaj, ideologiaj kaj mondperceptaj.

La konkludo estas : la<sup>a</sup> ne-politika (legu *neŭtrala*) movado de Esperanto, internacie reprezentata de U.E.A. kaj nacie de la Landaj Asocioj, havas nur unu celon. Ĉi tiu celo estas, ke nia lingvo estu akceptata ĉie kaj de ĉiuj. Ian ekonomi-politik-socian celon ĝi ne havas. Ĝi kunlaboras okaze de komuninteresaj penadoj kun ĉiuj organizaĵoj nomeblaj per ĝeneraliga maniero, ne-neŭtralaj.

La Deklaracio de Bulonjo tiurilate diras klare : "ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas."

H.J.

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## ARGENTINO

Vigla propagando karakterizas ĉi tiun landon, kaj oni jam komencas rikolti la fruktojn de antaŭa agado. La gazetoj jam ne ignoras la sendatajn informojn, sed publikigas novaĵojn pri la Esperanto-movado. Kursoj funkcias en tre multaj urboj kaj oni jam disdonis atestojn pri kapableco al multaj ekzamenitoj.

En Bern S-ro A. Vila Maynón reprezentis Argentinan Esperanto-Ligon. Tio estis la unua fojo, je kiu reprezentanto de la landa organizado partoprenis universalan kongreson.

Menciinda pro sia ekskluziva Esperantisteco estas la libertempejo San Sebastián, kiu per speciala aranĝo akceptadis ĉiudimanche multnombrajn Esperantistajn vizitantojn dum la printempo kaj somero. Tie oni povis pasigi agrablajn horojn en vere Esperanta atmosfero.

E I.

## BRITUJO

### Festo de Muziko en Kimrujo

La unua internacia festo de muziko en Llangollen estis bela sukceso malgraŭ grandaj malfacilaĵoj. Alvenis 21 horoj kaj 2 danctrupoj el pluraj landoj. Laŭ lingva vidpunkto la sukceso ne estis tiel bone; la Kimroj ja ne scias Eŭropajn lingvojn kaj la Angla lingvo aŭtokrate regis. Esperanto tamen utilis. Alvenis 130 salutoj el 24 landoj kaj pluraj Esperantistoj troviĝis en la horoj.

Nia laboro portis fruktojn. De nun la kunlaboro de la Esperantistoj estas petita, kaj oni jam preparas programojn por la agado en 1948. Okazos konkursoj por horoj geaj, viraj kaj virinaj, madrigal-grupoj kaj solkantistoj. Gastigado estos plej malmultekosta. Tri Esperantistaj horoj jam sin anoncis kaj oni esperas, ke la samideanoj vaste diskonigos la aferon. Skribu al la Esperanto-sekretario, S-ino K. Rossetti, School House, PONCIAU, Wrexham, Kimrujo.

## FINNUJO

Somera Esperanto-kurso okazis 2-11 de Julio en popolaltlernejo en Jämsä kun preskaŭ 200 partoprenantoj. Inter pli ol 40 eksterlandanoj troviĝis samideanoj el Norvegujo, Svedujo kaj Danujo. La kursprogramo konsistis el lecionoj kaj prelegoj pri kulturo kaj literaturo de nordaj popoloj. Prelegis J. Stenström kaj S. Engholm el Svedujo, D-ro H. Egerrup kaj L. Friis el Danujo kaj J. Rosbach el Norvegujo, Magistro V. Setälä kaj H. Koivu, Finnioj.

Grandan propagandan efikon havis la kursoj, kaj kursoj de Esperanto estas starigitaj en la urbo.

## FRANCUJO

La urbestro de Perpignan decidis subvencii la lokan Esperanto-movadon kaj voĉdonis 5.000 frankojn. Bela strato estas nomita *Strato de D-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto*.

## GERMANUJO

### Kongreso de Reinlando kaj Vestfalio

Okazis en Krefeld 13-15 de Sept. vere impona Esperanto-kongreso. En la stacidomo jam salutis la alvenantojn granda afiŝo kaj tie funkciis ankaŭ akceptejoj, kie la gastoj ricevis siajn dokumentojn.

Publika partoprenkunveno okazis en la vespero de Sabato kaj en la plenplena salono de la urba muzeo S-ro Schröder malfermis la kunsidon. Prezidanto de G.E.A., D-ro Ziegler, kaj reprezentanto de sindikato, mem salutis la kongreson. S-ro Wingen el Kolonjo faris belan kaj konvinkan paroladon pri la neceso de Esperanto, kaj S-ro Fox faris kun 10 knaboj demonstracian lecionon, kiu montris la simplecon de la lingvo.

Dum la kongreso oni havis specialan poŝtejon kaj uzis specialan stampilon por la okazo.

Oni okazigis multajn fakkunsidojn kaj faris multe da laboro preparante programon por estonta agado. Amuzvespero kaj ekskursoj aldonis al la ĝojo de la partoprenantoj.

J.S.

## HUNGARUJO

La Hungara Ŝtatfervojo proprakoste sendis el ĉiuj partoj de la lando proksimume 70 fervojistojn al urbeto Keszthely dum Septembro por partopreni monataŭran kurson de Esperanto. La celo estas, ke en ĉiu grava stacidomo troviĝu minimume unu fervojisto, kiu scias Esperanton.

La 7-an de Septembro okazis apud Budapeŝto en pilgrimejo *Maria Remete* la unua katolika meso post la milito kun Esperantaj prediko kaj kantoj. La predikon faris juna monaĥo P. Nikolao M. Boglári. Posttagmeze okazis kulturkunsido kun multaj paroladoj kaj deklamoj en la domo de la Servit-ordeno. Partoprenis 50 personoj.

Dum la hungaraj parlamentaj elektoj okazis ĉe la Socialdemokrata Partio Esperantlingva elektadkunveno. Tiu supozeble estis la unua en la historio. La varbparolon faris Prof. L. Kökeny.

En kunveno de H.E.S., P. Balkányi parolis pri la demokratio kaj klarigis, ke Esperanto plej multe floras en tiuj landoj kie regas la demokratia principoj, aŭ kie regas socidemokrata aŭ laborista partio.


La Komitato de Sanigbanejo de Budapeŝto, V., Molotov-tér 3, preparas Esperantan prospekton. Petu multnombro.

## ITALUJO

Venkinte grandajn malfacilaĵojn la Itala Esperantistaro rikoltis bonajn fruktojn dum ĉi tiu jaro. Inter la plej notindaj estas la vigla agado de Itala Instituto de Esperanto (malnova grava nacia instituto kiu estras la kulturen kaj instruon Esperanto-movadon), la fondo de Itala Laborista Esperanto-Asocio, restarigo de la Itala Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj, aktiveco de la malnova eldonfirmo A. Paolet, kiu publikigas taŭgajn lernolibrojn kaj propagandilojn. Atentinda estas la apero de ĉiumonata gazeto *Verda Steleto*, kiu aranĝis la unuan postmilitan nacian kongreson. Sed plej grava estas la starigo de vasta reto de Delegitoj de U.E.A. Grava medicina revuo *Giornale di Clinica Medica* donas en Esperanto resumojn de la ĉefaj artikoloj.

## KOREO

Laŭ letero kiun sendis Usona samideano, ni ĝojas anonci, ke en ĉi tiu malproksima lando, fortranĉita for de la cetera mondo, Esperantismo floras kaj viglas. La skribinto diras "... ni havas ĉi tie tre viglan movadon. Hieraŭ mi renkontis proksimume kvardek samideanojn, malgrandan parton—ili diras—el la tuto." Oni instruas Esperanton en lernejo por instruistoj, kaj ni ĉi tie donas bildon de kursfinintoj.



## NEDERLANDO

En Arnhem la 4-an de Oktobro oni inaŭguris straton kun nomo *Esperanto-Laan*. Ĉeestis la Urbestraro, reprezentantoj de la Nederlanda Centra Komitato Esperantista kaj la Arnhema Kunlabora Komitato.

Por festi la 35-jaran ekziston, la Unuiĝo "Antaŭen" en Zaandam organizis 13-21 Septembro Esperanto-Semajnon, kiu povas servi kiel ekzemplo kaj inspiro al aliaj grupoj. Per mondonacoj de la urbestraro, la sindikatoj, la

grupoj kaj unuopaj samideanoj oni kolektis 2000 guldenojn, per kiuj oni gastigis 26 eksterlandajn samideanojn el 10 landoj dum tuta semajno. Ekskursoj tra norda Nederlando, vizitoj al grupoj, al fabrikejoj, al Roterdamo kaj Amsterdamo faris unikan propagandon por Esperanto kaj samtempe ebligis al la gastoj intime kontakti la vivon de la popolo. Kelkaj gastoj parolis en la radio Hilversum 17-an de Sept. Inter la gastoj troviĝis Ĉefdelegito de U.E.A. en Svedujo S-ro E. Adamson, R. Levin direktoro de propaganda fako de la Foiro de Lyon, Mason Stuttard konata literaturisto, kaj J. Rosendahl S.A.T.-peranto por Norvegujo.

Kiam oni frontas al la diversaj financdekretoj, kiuj limigas la internacian kontakton, oni ne povas nei, ke jen estas bela kaj ideala solvo de multaj niaj problemoj pri vizito eksterlanda kaj altvalora rimedo por propagandi nian ideon.

## NORD-AMERIKO

La 37-a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (E.A.N.A.) okazis sukcese en Conway (New Hampshire) de la 3-a ĝis 6-a de Julio. La Ĝenerala Sekretario, G. Alan Connor, faris Jaran Raporton el kiu evidentiĝis, ke oni faras progreson. Membro-ciferoj konstante kreskas.

La Kongreso voĉdonis novan Statuton de E.A.N.A. en kiu pli klare kaj koncize la funkcioj de la Estraro estas difinitaj. La nova Estraro konsistas el la jenaj: Prezidanto, Prof. D-ro Edwin L. Clarke; Vic-prez., D-ro William Solzbacher; Ĝen. Sekr., S-ro G. Alan Connor; Kasisto, S-ro Harry Harrison; Asociaj Direktoroj, D-rino L. A. De Vilbiss, S-ro J. Leahy, S-ro D. W. Gibson.

La Prezidanto, kiu ne povis ĉeesti, sendis raporton en kiu li atentigis pri enkonduko de Esperanto en pluraj usonaj universitatoj kaj lernejoj. Alvoko al profesoroj kaj instruistoj, ke ili lernu kaj instruu Esperanton, jam ricevis subskribojn de 41 universitataj kaj kolegiaj profesoroj en Usono, Kanado kaj Puertoriko. En Kolegio Rollins la Esperanto-lecionoj havas saman valoron por la ekzamenoj kiel la aliaj fakoj.

Dum la pasinta jaro *American Esperantist*, unu el la plej belaj kaj plej interesaj gazetoj, troviĝis en 105 publikaj kaj universitataj bibliotekoj. La eldonnombro estas 2000.

Ĉefan preparan laboron por la kongreso faris S-ino Doris Tappan Connor kaj surloke funkciis F-ino Roan Orloff. Inter ĉefaj parolantoj estis S-ro Ernest C. Dodge, F-ino Orloff kaj D-ro W. Solzbacher.

W.S.

## POLUJO

## Internacia Esperanto-Tago

En la tagoj de la Gdanska Foiro la Polaj samideanoj aranĝis specialan fest- kaj propagandtagon 10-an de Aŭgusto, kiun partoprenis multaj Esperantistoj el diversaj partoj de la lando. Ceestis unu ĉefa samideano.

Interkonatiga vespero antaŭ la Tago kreis la taŭgan atmosferon. Post prelegoj la partoprenantoj en la Tago vizitis la Foiiron, kie troviĝis impona Esperanto-vizito.

En Gdansk, Gdynia kaj Wrzeszcz la movado ricevas grandan apogon flanke de edukaj instancoj, kaj penetris sin en plurajn lernejojn.

## LA PETSKRIBO

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 6-a de Oktobro :

## Landoj

|                  |       |                  |        |
|------------------|-------|------------------|--------|
| Nederlando ..    | 46843 | Hungarujo ..     | 3589   |
| Francujo ..      | 31322 | Portugalujo ..   | 3462   |
| Britujo ..       | 27057 | Aŭstralio ..     | 3063   |
| Ĉeĥoslovakujo .. | 23287 | Nov-Zelando ..   | 2540   |
| Bulgarujo ..     | 21463 | Egiptujo ..      | 1794   |
| Germanujo ..     | 18676 | Svisujo ..       | 1584   |
| Svedujo ..       | 17769 | Maroko ..        | 1037   |
| Norvegujo ..     | 13750 | Grekujo ..       | 810    |
| Jugoslavujo ..   | 11740 | Palestino ..     | 505    |
| Danujo ..        | 9106  | Irlando ..       | 463    |
| Polujo ..        | 7907  | Urugvajo ..      | 460    |
| Aŭstrujo ..      | 7644  | Kanado ..        | 359    |
| Belgujo ..       | 6604  | Hispanujo ..     | 276    |
| Finnujo ..       | 6340  | Hindujo ..       | 225    |
| Usono ..         | 6254  | Ceteraj lokoj .. | 733    |
| Argentino ..     | 6248  |                  |        |
| Italujo ..       | 5844  | sumo ..          | 296949 |
| Brazilo ..       | 4130  |                  |        |
| Islando ..       | 4065  |                  |        |

## Okupoj

|                         |       |                   |        |
|-------------------------|-------|-------------------|--------|
| Artistoj ..             | 1772  | Navigaciistoj ..  | 1048   |
| Delegitoj Komunumaj ..  | 472   | Parlamentanoj ..  | 214    |
| Dentistoj ..            | 475   | Policistoj ..     | 1940   |
| Desegnistoj ..          | 1922  | Presistoj ..      | 2994   |
| Dommastrinoj ..         | 41140 | P.T.T.-istoj ..   | 6540   |
| Edukaj Aŭtoritatuloj .. | 1043  | Religiistoj ..    | 1323   |
| Elektristoj ..          | 2601  | Sciencistoj ..    | 1072   |
| Farmacistoj ..          | 1088  | Sindikateĉefoj .. | 402    |
| Farmistoj ..            | 9084  | Soldatoj ..       | 3065   |
| Hotelistoj ..           | 1519  | Studentoj ..      | 27421  |
| Inĝenieroj ..           | 12334 | Ŝoforoj ..        | 2136   |
| Instruistoj ..          | 17019 | Ŝtatoficistoj ..  | 6864   |
| Juristoj ..             | 1339  | Teksistoj ..      | 1299   |
| Ĵurnalistoj ..          | 1027  | Transportistoj .. | 13508  |
| Komercistoj ..          | 51027 | Urboficistoj ..   | 3302   |
| Konstruistoj ..         | 5737  | Vendistoj ..      | 8509   |
| Kuracistoj ..           | 3911  | Vestistoj ..      | 5423   |
| Laboristoj ..           | 19365 | Diversaj ..       | 16410  |
| Lingvistoj ..           | 283   |                   |        |
| Metiistoj Diversaj ..   | 20321 | sumo ..           | 296949 |

Oni povas rimarki grandan malkreskon ĉe la nombro de ensenditaj folioj dum la pasinta monato. Espereble tio estas nur sekvo de la

feria sezono. Multa laboro ankoraŭ estas farebla sur ĉi tiu kampo, kaj ni esperas ke niaj samideanoj streĉos ĉiujn fortojn por fari imponan rezulton kiam nia kampanjo finiĝos—laŭ tio kion ni scias, tio definitive estos en la printempo. Do, unu lastan klopodon, ni petas.

En la momento kiam ni skribas, neniu ankoraŭ profitis la informon kiun ni donis en la antaŭa numero, t.e. pri la kolektiva alsendo de subskriboj. Ni do ripetis tion, ke ni nun rajtas ricevi opajn subskribojn de asocioj, sindikatoj, kluboj kaj simile, kondiĉe ke la subskribita teksto estas tiu, kiun ni ĉiam uzas, kaj la prezidanto aŭ ĉefa funkciulo mem subskribu. Necesas almeti nur "En la nomo de—membroj" (Citu la nombron).

Rimarkinda en la tabeloj dum pasintaj monatoj estas la progreso de Germanujo. Ĝi jam okupas la sesan vicon de la supro kaj la indiko estas, ke tiu cifero tre baldaŭ konsiderinde kreskos, ĉar en tiu lando oni fervore laboras por nia kampanjo. Ni gratulas niajn samideanojn tie.

## ESPERANTISTA VIVO

## Naskiĝoj

**Bazsó**—Je la 23a de Septembro al Ge-sroj D-ro Bazsó, Békéscsaba, Hungarujo, filo nomita Stefano Karlo.

**Liechti**—Al Ge-sroj F. Liechti, Rheineck, Svisujo, naskiĝis 30an de Septembro filino nomita Edith.

**Swart**—Al Ges-roj A. Swart en Landsmeer, Nederlando, naskiĝis 2-an de Oktobro filino Lijsje.

**Walder**—Al Ges-roj O. Walder en Romanshorn, Svisujo, naskiĝis 6-an de Oktobro filino Ruth Alice.

**Young**—Je la 24a Septembro al Ge-sroj K. J. Young, North Cheam, Surrey, Anglujo, filino nomita Wendy.

## Edziĝoj

**Bracci—Cheli**—D-ro Piero Bracci, Delegito de U.E.A. en Livorno, Italujo, kun F-ino Rosalba Cheli, 10-an de Septembro.

**Kulhanek—Hromadová**—S-ro Jaroslav J. Kulhanek kun F-ino Eva Hromadová, filino de Rud. Hromada, estinta Estrarano de U.E.A. en Praha.

**Naoumoff—Grognez**—S-ro Constantin Naoumoff, en Parizo kun F-ino Marcelle Grognez.

Al ĉiuj ni direktas tre sinceran gratulon.

## Niaj Mortintoj

Ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencan. Universala Esperanto-Asocio.

**Archer**, S-ro F., ano de I.E.L. en Hobart, Tasmanio, post longa malsano 31.I.1947.

**Farmer**, S-ino Elisabeth, 82-jara, fervora Esperantistino de 1905, en London, Anglujo, 9.VII.47.

**Harrison**, S-ro J. W., 73-jara, fondinto de grupo en Burnley en 1906, Anglujo, 11.V.47.

**Smith**, S-ino Nina F., 86-jara en St. Leonards, Anglujo, 7.V.47.

**Wackrill**, F-ino Ada S., 77-jara, fratino de Akademiano Wackrill, en Leamington, Anglujo, 27.I.47.

# ESPERANTISTAJ PROBLEMOJ

## La Germanoj kaj ni

La fino de la Tria Regno nuligis la malpermeson pri nia lingvo en Germanujo. Iom post iom la malnovaj batalintoj por nia ideo reaperas kaj rekomencas la laboron. Malgraŭ la efektive grandaj malhelpoj ĉiuspecaj, la mizera vivo, la ĝenerala apatio de la germana popolo, la manko de lerniloj, la nesama sinteno de la Militistaj Registaroj, k.t.p., la germanaj Esperantistoj aktive laboras. Je centoj sumiĝas la korespondaj alvenantaj ĉiumonate en la du oficejoj de U.E.A. kaj informantaj pri nova agado kaj petantaj pri helpo ĉiuspeca.

Ĉi tiu reveno de perdiĝinta filo en la rondon familian, metas antaŭ la Estraron de la Asocio gravajn problemojn, nefacile solveblajn. Utilas ke la publiko Esperantista konu la diversajn aspektojn de ĉi tiu *germana problem* en la internacia Esperanto-movado. Malgraŭ nia firma intenco ne tuŝi politikon, ni tamen devas surpaŝi ĉi tiun terenon pro la intima interligo de la demando kun la ĉiutagaj okazantaĵoj. La ĝeneralan problemon germanan nia kunlaboranto Georges Agricola iufoje prilumas laŭ la vidpunkto de homarano.

La re-enkorpigo de la germana Esperanto-movado en la internacian dependas de tri kondiĉoj: ideologia, politika, financa. Ni vidu la situacion tia, kia ĝi estas kaj ni juĝu senpasie.

### Ideologia kondiĉo

Ni elektis ĉi tiun vorton *ideologia* ĉar ĝi permesas grupigi karakterizaĵojn pli malpli identajn. Ni volas diri tute simple, ĉu ni akceptu senkondiĉe la filon revenintan? Ĉi tiu demando povas ŝajni stranga al iuj, sed al multaj samideanoj ĝi estas afero de konscienco. Nefacile estas por multaj samtempuloj forgesi, kio okazis de 1933 ĝis 1945!

Kristaliĝis ĝis nun tri ebloj de sintenado rilate al la partopreno de la germanaj Esperantistoj en U.E.A.

(1) Absoluta kontraŭeco, ke germanoj partoprenu nian internacian organizaĵon, almenaŭ dum difinita tempo. Ĉi tiu rigora sinteno estas postulata de samideanoj kies gento aŭ lando treege suferis sub la Nazi-tiraneco. Iuj krome postulas, ke eminentaj Esperantistoj germanaj esprimu sian malaprobon pri la kruelaĵoj de la Nazi-reĝimo.

(2) La dua vidmaniero estas tiu de absoluta neŭtraleco (legu *indiferenteco*!) pri ĉio pasinta. Oni argumentas proksimume tiel, ke nia movado

estas nepolitika, lingva kun tendenco tuthomara kaj homaraneca. La milito finiĝis, la mondo postulas pacon kaj rekonstruon. Ne estas nia tasko juĝi pri io, kio ne dependas de nia povo kaj fari esprimon de kondamno.

(3) La tria vidpunkto estas tiu de la *ora mezo*. Unue ni devas postuli de la nova Germana Esperanto-Asocio ke ĝi mem ne toleru inter si elementojn, kiuj kapablis kunigi ideo la verdan stelon kun la hoko-kruco. Due, ni ne akceptu kiel reprezentanton de la germanaj Esperantistoj personon, kiu partoprenis aktive la Nazi-partion aŭ kiu videble simpatiis kun ties celado. Por paroli ĝenerale, ni atendas, ke oni ne prezentu al ni aligon de estinta Naziano.

Mi malfermas la diskuton pri ĉi tiu penplena afero kaj laŭ ricevotaj respondoj ni povos juĝi pli facile. Estu tamen rimarkate, ke ĝenerale la germanaj Esperantistoj restis fidelaj al la idealo de nia afero. Inter la aliaj, aligintaj al la Nazi-frenezo, ni distingu la aktivulojn kaj tiujn, kiuj devige eniris la partion (post 1933) por savi sin de la civila morto aŭ por ĉesigi tedajn ĉikanojn de la polico. Aliflanke, ni opinias, ke estas nia tasko kunhelpi al la spirita releviĝo de la germana popolo en la modesta kadro de nia movado. Ni fidu al la nunaj estroj de la Germana Esperanto-Asocio, kiuj ja mem estis viktimoj de la reĝimo.

### Politika kondiĉo

Dum jaroj ankoraŭ, la germana problem venenos la interŝtatajn rilatojn kaj se ne en lasta minuto la venkintoj interkonsentos pri klara unuforma sinteno antaŭ la germana popolo, la tute anarkio ne estos evitebla. Ĉi tiu videbla manko de gvidlinio influas ankaŭ nian agadon en Germanujo, kiu, ni diru tion tuŝ, estas kaj estos dum longa tempo tre modesta. Kial? La dispartigo de la regno en tri aŭ kvar zonojn, la malsama regado de la Militistaj Registaroj, la neklareco pri societa agado, kaj fine la poŝta servo mezepoksimila estas komplikaj kaj neforigeblaj rapide. Nur la Brita okupada aŭtoritato permesis liberan allason de eksterlandaj periodaĵoj; kaj presaĵoj estas sendeblaj nur el Britujo en la Britan kaj Usonan zonojn. Por ke ni povu labori sen tro granda perdo de tempo kaj mono, ni faras la humilan peton, ke oni ĉiel faciligu la restarigon de rilatoj de la germanaj kontraŭ-naziuloj kun la eksterlando, kaj forigu ĉiujn jam cititajn barojn (societan agadon, ricevon de presaĵoj el eksterlando, toleron de periodaĵoj, faciligon pri la ricevo de vojaĝpermeso al eksterlando).

Por ke la Militista Aŭtoritato en Germanujo povu fidi la germanajn Esperantistojn, tre klara kaj decida sinteno pri la Naziismo estas ĉefa kondiĉo. Neniel oni povus toleri kompromititajn personojn. La nova Germana Esperanto-Asocio devas tre atenti pri siaj agoj kaj neniel permesi, ke sub kvinpinta verda stelo estu iel propagandataj naziismaj deziroj aŭ tendencoj.

Germanujo estas hodiaŭ vera batalkampoj prilingva. La Militistaj Registaroj ĉiel subtenas la instruadon de la propra lingvo. La angla lingvo videble pleje sukcesas pro faktoroj konataj. La franca lingvo sekvas nur duavice kaj la rusa serĉas ankaŭ sin penetri. La sperto de ĉi tiu desupre ordonita kaj apogita instruado certe estas sciindaĵ. Hazardo volis ke ni ricevu de unu el niaj korespondantoj en Berlino broŝuron germanlingvan kun titolo *Kial la homoj parolas diversajn lingvojn?*\* Ni konfesas, ke la maniero prezenti problemon memorigas la procedon de la teoriuloj de la Tria Regno. La lingva problemo estas prezentata sub la lenso de politik-ekonomia doktrino kaj oni havas la impreson, ke la mondo finiĝas jam ĉe la Odra rivero en Germanujo. Neniu aludo pri la sinteza helplingvo, la longa vico de provoj, la multaj spertoj akiritaj kaj la vivanta ekzemplo de Esperanto. Neniu citaĵo pri eminentaj lingvistoj germanaj, sed teda trolaŭdado de rusaj.

### Financa kondiĉo

Kiamaniere pagi la kotizon? Ĉi tiu demando centfoje farata al ni starigas antaŭ la administradon de la Asocio komplikitan aferon. La germana mono estas enlanda pago diviga. Efektiva mezurilo por objektoj ne aĉeteblaj per la ftiza marko estas aliaj objektoj, kaj inter ili la cigaredoj. Eksterlande la germana valuto brilas pro foresto en la kurztabeloj kaj tiel estos verŝajne dum longa tempo. Sekve, kia ajn sumo fiksita por la kotizo ne konformas al la realaĵoj kaj ĉia pago estas, por tiel diri, *simbola*. Laŭ diversaj informoj la stabiligo de la germana marko supozeble okazos je la bazo de 400 gmk. por unu pundo sterlinga, kio egalas je ĉirkaŭ 17.50 fr. svisaj, aŭ 100 gmk. egalas 5 ŝil.=4.40 sv. fr. Se oni akceptas kiel bazon de kalkulo la poŝtan tarifon germanan, 30 centimoj sv.=0.75 gmk., aŭ 1 fr. sv.=2.50 gmk. Sekve MA-kotizo devus esti 30 gmk.

La konkludo por ni estas do, ke de komerca vidpunkto Germanujo estos dum longa tempo deficita, tiel por nia afero, kiel por la tutmonda ekonomio. Kiom longe ĉi tiu deficita mastrumado

daŭros, dependos de politikaj kaj psikologiaj faktoroj, kiujn ni neniel povos influi.

Kiel konkludon de ĉi tiu situaĉia analizo ni premisu la jenon:

(1) Nia movado havas elementan intereson, ke Germanujo ree partoprenu ĝin, plenrajte, sub sola rezervo de la komence fiksataj ideologiaj kondiĉoj.

(2) Rekonante, ke la plimulto de la germanaj Esperantistoj restis fidelaj al nia idealo, la decidantaj povoj de la movado zorgeme ekzamenos la eblojn praktike helpi la laborantojn en Germanujo.

(3) Konsilinde estas konservi en rilatoj kun germanaj Esperantistoj prudenton, kaj ne akcenti al ili kvazaŭ kunkulpecon de ĉio okazinta. Nia tasko estas rekonstrui, kaj ĉiu fidinda homo estu bonvenigata. Al la ekskluziveco de la pasintaj estroj de la Tria Regno ni kontraŭmetu la principojn de nia Statuto, la neforigeblajn rajtojn de la homo.

Finante ĉi tiun necesan kaj atendatan priksideron de delikata situaĉio, ni atentigu ke la verkinto de ĉi tiu artikolo dekomence kontraŭis parole kaj age la naziismon, kaj sekve opinias pri rajtigita paroli favore de prudento kaj homaraneco.

Hans Jakob.



### Bonvenon al la 33-a!

La venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Malmö, Svedujo. Pro valutaj cirkonstancoj la Sveda Esperanto-movado elektis la nomitan urbon en la plej suda provinco, ĉar ĝi estas sufiĉe proksima de la plej granda parto de la eŭropa kontinento.

La sveda movado kore bonvenigas vin al la 33-a, al la kongresa urbo, al la provinco Skanio kaj cetera al la tuta Svedujo. Ni esperas, ke la kongreso estos rezultoriĉa kaj ke ĝi alportos novan energion al la movado.

Jam nun anoncu vin! Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe: 33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

Loka Kongresa Komitato.

\* Prof. W. Nikolski kaj Prof. N. Jaowlew: Warum die Menschen in verschiedenen Sprachen sprechen.

62 p. Berlin, 1947.

# INTERNACIA KONFERENCO, PARIZO 1948

pri nuntempaj problemoj politikaj, ekonomiaj kaj intelektaj, Parizo, Pentekosto, 1948

## Dua Komunikio

Adreso : 34 rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo.

### (2) Administraj Komisionoj :

#### (a) Ĝenerala Organizado :

Prezidanto : Madeleine Sautreuil, Kantistino de Franca Radio.

Vic-prezidanto : S-ro Léon Belhoste, direktoro pri financoj de la Urbo Paris, Ĝen. Kas. de U.E.F.

Ĝen. Sekr. : S-ro Etienne Gaudry, kontisto.

Membroj : F-ino Mahe, S-roj Schwartz, Briot, Tabernat.

#### (b) Komisiono pri financo :

Prezidanto : S-ro Dusauso, juvelisto.

Membroj : S-ro Raymond Schwartz, Bankdirektoro, S-ino Petit-Lebrun, S-ro Belhoste.

### (3) Teknikaj Komisionoj :

#### (a) Politika Komisiono :

Prezidanto : S-ro Emile Vanrullen, Kvestoro de la franca respubliko, Konsilanto de la Departemento Pas-de-Calais (socialista partio).

Vic-prezidanto : S-ino Marliere-Pelletan (radikala partio).

Vic-prezidanto : Doktoro Berard (komunista partio).

Ĝen. Sekr. : S-ino Andrée Vanrullen, profesorino.

Helpĝen. Sekr. : S-inoj Petit-Lebrun, Choulal (eksorganizantinoj de la franca rezistado).

#### (b) Ekonomia Komisiono :

Prezidanto : S-ro Jules Jullien, eksprezidanto de la Solena Malfermo de la konferenco *Esperanto en la Moderna Vivo*; eksministro, Deputito de Rhône, Prez. de la Respublika Komitato pri Industrio, Komerco kaj Agrikulturo.

Vic-prezidanto : S-ro Dusauso, Konsilanto pri la Eksterlanda Franca Komerco.

Ĝen. Sekr. : S-ro Lucien Laurat, ekonomiisto.

Helpĝen. Sekr. : S-ro Robert Filliâtre, Ĝen. Sekr. de ILEPT.

Helpsekr. : S-roj Drappier (komerco), Levin (foiroj), Chirol (laborista sindikato), Robert (bankoj), Chicot (martransporto), Poly (fervojs transporto), Badez (aviado), Roubinet (radio), Broise (ŝoseoj), A. Schwartz (doganoj kaj polico), Retault (int. komerco kaj ekonomio), Dronchat (juro).

#### (c) Scienca Komisiono :

Prezidanto : S-ro Aimé Cotton, Vic-prezidanto de la Franca Akademio.

Vic-prezidanto : Prof. E. Vanverts, dekanato de la medicina Fakultato de Lille.

Ĝen. Sekr. : Ing. Constantin Naoumoff.

Helpsekr. : Prof. Beau, S-ro Pichot, inventisto, S-ro Watier.

#### (d) Intelektala Komisiono :

Prezidanto : S-ro Pariselle, Rektoro de la Universitato de Grenoble.

Vic-prezidantoj : S-roj J. Couteaux, Doktoro pri Juro, Prof. G. Waringhien, agregaciulo pri Beletristiko, S-ro G. Avril, ĵurnalisto.

Ĝen. Sekr. : Jacques-Louis Mahe, kinisto.

Helpsekr. : S-inoj Racine, profesorino, Y. Labatut, teatro.

La ĝenerala traktado de la temoj dum la konferenco estas :

(1) Politika Komisiono : (a) ĉu estas eble trovi sintezon inter la okcidenta kaj la orienta vidpunktoj pri demokratio ? (b) ĉu tutmondaj parlamentoj kaj estraro estas ebla ? ĉu la superŝtato estas realigebla aŭ nur utopio ?

(2) Ekonomia Komisiono : (a) kio estas plej bona por la popoloj : la liberalismo aŭ la ŝtata ekonomia direktismo ? (b) inter la diversaj ekonomioj, kapitalista, ŝtatsocialista aŭ abundeca, kiu devos gvidi de nun la ekonomian vivon ?

(3) Scienca Komisiono : diskutos la lastajn inventaĵojn kaj diskutos la sekvojn de la atoma bombo por la homaro.

(4) Intelektala Komisiono : (a) ĉu la homoj rajtas esti tute sendependaj, sen ŝtata kontrolo pri pasportoj, doganoj, devizoj k.t.p. aŭ ĉu la intereso de la diversaj ŝtatoj devos limigi la sendependecon de ties ŝtatanoj ? (b) ĉu la gazetaro kaj la radio devas esti sendependaj, ŝtatkontrolataj aŭ ŝtadirektataj ? (c) kiel eduki la infanojn : por la individuo, la familio, la ŝtato, la nacio aŭ la homaro ?

Ni kore petas ĉiujn Esperantistojn en la mondo, kaj precipe parlamentanojn, politikistojn, ekonomiistojn kaj intelektulojn, sin turni al ni por la prepara laboro de la konferenco.

Ni ankaŭ petas ĉiujn Esperantistojn, kiuj volas helpi la sukceson de la konferenco, sendi al sia landa asocio monhelpon por la konto de la konferenco. Ni bezonas sufiĉe grandan sumon por realigi niajn planojn.

Kuraĝe antaŭen ! Dankon !

PIERRE PETIT,

Prezidanto de la Organiza Komitato.

## UNESCO—Ĝustigo

Leginte la raportojn pri UNESCO en la oktobra numero de ESPERANTO mi trovas necese fari la jenan ĝustigon.

La koncerna subkomitato ne faris *decidon* ke la angla, franca kaj aliaj lingvoj *estos* la helplingvoj. Ĝi nur rekomendis tion—grava diferenco.

Estas konsilinde esti singarda en prijuĝo de ĉi tiu afero, kaj ne tuj konkludi, ke la rekomendo estos adoptata de la estraro de UNESCO.

E. D. Durrant.

## NOVAJ ABONPREZOJ

### Heroldo de Esperanto.

Oktobro 1947—Decembro 1948. 17 ŝil. 6p.

### Internacia Kulturo. 1948. 10 ŝil.

Pageblaj ĉe UEA

## Movado Por Federacia Mondregistaro

### Kongreso en Montreux

Pli ol 200 delegitoj el 15 landoj kunvenis en Montreux, Svisujo 17-24 de Septembro, 1947, por interŝanĝi ideojn kaj trovi vojon de kunlaboro por la alta celo krei mondon en kiu milito, kiel rimedo por solvi konfliktojn, estos neebla.

La Universala Ligo estis reprezentata de Andreo Cseh kaj Julia Isbrucker, kiu samtempe reprezentis la Universala Esperanto-Asocio'n.

Dum la solena malferma konsido, D-ro M. Habicht, prezidanto de la provizora konsilantaro, kaj Henry Osborne, membro de la Brita Parlamento, faris impresajn paroladojn. La kongreslingvoj estis franca kaj angla, kaj ni denove spertis la malavantaĝon, malgraŭ ke la profesia tradukistino brile tradukis ĉion. Sed la atmosfero dum la paroladoj multe suferis pro tio, ke ĉiam parto de la publiko ne komprenis kaj komencis flustri aŭ forlasis la salonon.

La sekretario S-ro Tom Griessemer laŭtlegis mesaĝon de U.E.A. kaj aldonis, ke ĵus okazis impresa kongreso de la Esperantistoj en Bern.

Andreo Cseh raportis pri la Universala Ligo kaj faris tion laŭ sia kutimo en Esperanto. Granda surprizo ĉe la estraranoj kaj kongresanoj, sed oni aŭskultis atente kaj grandparte komprenis. La tradukistino estis iom embarasita, sed S-ino Isbrucker tuj lasis sekvi la tradukon en franca kaj angla lingvoj. La klara kaj mallonga parolado en Esperanto vekis grandan intereson.

Estis surpriza fakto, ke en la programo de la Itala Federacio Movado (Movimento Unionista Italiano) kiel unu el la punktoj troviĝas la enkonduko de Esperanto. Ni kompreneble tuj serĉis kontakton kun la gvidanto de la itala delegitaro, Prof. Ugo Damiani, parlamentano, kiu montris grandan intereson pri la laboro de U.L.

En la rekomendita laborprogramo troviĝas la jena: "Mobilizi la popolojn de la mondo por instigi siajn registarojn kaj parlamentojn transformi la organizaĵojn de la Unuigintaj Nacioj en federacian mondregistaron kun pli da aŭtoritato kaj pli da rimedoj kaj kun reviziita ĉarto."

### Malaperintaj samideanoj

Estas serĉataj la sekvantaj personoj. Kiu povas doni utilajn sciigojn pri lasta adreso, volu tion komuniki al UEA, Esperantista Interhelpo, Palais Wilson, Genève, Svislando.

**Georges Ramboux**, Paris. Katolika pastro, redaktoro de *Espero Katolika*; sen sciigoj pri li post 1939.

**von Schmidt auf Altenstadt, Georg**. Nederlandano servinta en Indonezio, de 1913 ĝis 1935 en Svislando, poste en Vaals, Limburg, Stationstraat 8. DM de UEA. Sen novaĵoj pri li post 1939.

**Minuška Mantel, F-ino**. Fervora propagandisto en Vieno kaj Lwów. Ni laste rilatis kun ŝi en 1942; de tiam sen novaĵoj.

**Gerardus Adrianus Marie Dercks**, frato de nia FD en Bergen-op-Zoom, Nederlando. Arestita kaj transportita al la koncentrejo Vucht. Mortpafita tie laŭdire 5.9.44. Postaj informoj montris ke li estas transportita al Sachsenhausen koncentrejo. Tie oni perdis postesiginojn. Antaŭ nelonge alvenis informoj ke li troviĝas en loko Puhoviči, distanco 90 km. de la malnova pola-rusa limo (Minsk). Li lametas pro ricevita vundo, sed estas sana kaj laboras kiel ĝardenisto. Utilajn sciigojn al J. F. C. M. Dercks, Antwerpschestr. 45, Bergen-op-Zoom, Nederlando.

### Sendo de nutraĵoj

Je centoj sumiĝas la helpokrioj, precipe el Germanujo, kaj por kontentigi ilin eĉ nur per unu sendaĵo ni devus disponi pri miloj da frankoj. El la korespondadoj vidiĝas la sekvo de la longdaŭra disigeco de la Germana popolo de la cetera mondo, esprimita en absoluta malkono de kondiĉoj. Por la plimulto Svislando estas vera paradizo, insulo de feliĉuloj, lando kie fluas mielo kaj lakto. Por riĉuloj la vivo ĉi tie estas sendube paradiza, sed la salajrataj (t.e. la Esperantistoj ĝenerale) sentas la senvalorigon internan de la mono, kio montriĝas en tio, ke ĉio elspeziĝas por la fizikaj bezonaĵoj. Multaj enŝuldiĝas kaj la strikoj montras la malkontentecon de la laboranta klaso.

Ni devas tion diri por ke niaj amikoj ne komprenu malbone nian decidon, ne plu aperiĝi helpopetojn, kiuj tamen restas neplemumeblaj. Aliflanke la Svisa popolo daŭre partoprenas en ĉi tiu granda helpverko DON SUISSE, plie libervole akceptis la konsumlimigon de lakto kaj fromaĝo, sendota eksterlanden al diversaj helpentreprenejoj.

La Esperantista Interhelpo povas peradi sendaĵojn, kiujn bonvolaj amikoj volas pagi. Ĝi ne povas kreditigi tion, pro manko de disponebla mono kaj la ĝenantaj paglimigoj de aliaj landoj kontraŭ Svislando.

*Universala Esperanto-Asocio,  
Esperantista Interhelpo,  
Palais Wilson, Genève.*



**Letervespero ! Kia Preteksto ! !**

# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe I.E.L.



\***Esperanto 60-jara.** Originale verkita de G.J. Degenkamp. Libroservo de F.L.E., Amsterdam, 1947. 60 p. 16.5×24. Kartonita 3ŝ. 6p., afranko 2p.

La verkinto de ĉi tiu libro havis la bonan ideon prezenti skizon pri la evoluo de la literatura lingvo dum la 60-jara publika vivo de Esperanto, kaj la rezulto de lia laboro certe interesos kaj pensigos ĉiun seriozan studenton. Li detaligas la stilajn apartaĵojn de la plej gravaj verkistoj, originalaj kaj tradukaj, kaj esploras la uzadon de diversaj vortoj kaj vortformoj sub iliaj plumoj. Atentigante pri la diferencoj inter la plej primitiva kaj la plej moderna formoj de la lingvo, li provizas al la leganto ekzemplojn de ambaŭ, represigante ĉe la fino de sia verko unue la konatan tradukon de Grabowski *La Neĝa Blovado* de Puŝkin, kaj poste kvinpaĝan fragmenton el la verko *Cezaro* de Jelusiĉ, tradukita de Rotkviĉ.

Inter multaj evoluigaj faktoroj menciitaj en la verko, oni citu la liberecan sintenon de Zamenhof mem rilate al la stilo de aliaj verkistoj, la insiston de Prof. Cart kaj aliaj samopiniantoj pri plena fideleco al la Fundamento kaj obeemo al la decidoj de la oficialaj lingvo-instancoj, la aplikon de la principo pri *neceso kaj sufiĉo*, rekomendita de la Akademio en 1913, kaj la gramatikan influon de la naciaj lingvoj.

Degenkamp agnoskas la stabiligan influon de la *ĝisostaj* fundamentistoj, sed rimarkigas pri la ridinda sinteno de tiuj verkistoj kiuj insistas kopii eĉ la erarojn de Zamenhof; li devus ankaŭ averti, ke la fundamentismo per si mem ne garantias bonstilon; tion ĉi ekzempligas interalie la aŭtobiografio *Travivaĵoj de Ro Ŝo*, kiun li mencias kiel modelon de simpla laŭfundamenta stilo.

Unu el la plej gravaj problemoj en la uzado de Esperanto estas la konflikto inter la logiko kaj la lingvokutimoj; al malmulte da homoj oni instruas pri la logiko, sed ĉiuj senescepte akiras lingvokutimojn, antaŭ ol lerni Esperanton, kaj ĉi tiuj plej ofte venkas super la logiko, kio estas bedaŭrinda ĉe lingvo, kiun oni prezentas en la propagando kiel eminente logikan. Pri ĉi tiu punkto Degenkamp konstatas ankaŭ, ke la neperfekteco de la Esperanto-gramatiko iugrade limigas la rigoran aplikon de la logiko al la lingvo. Aliflanke li konfesas, ke la gramatikaj reguloj de sole internacia lingvo ne tiel strikte katenas la verkiston, kiel la reguloj de natura gepatra lingvo, kaj ke tio parte kaŭzas la liberecon, eĉ tro-liberecon, kun kiuj kelkaj aŭtoroj traktas la gramatikon de Esperanto.

La uzo de *sen* antaŭ infinitivo *rigide ŝokas* la aŭtoron, sed ne estas klare, kial tia uzo estas malrekomendita. La logiko ŝajnas ĝin subteni. La ĉi-rilata *Lingva Respondo* de Zamenhof estas arbitra kaj ne tre konvinka. Estas dubinde, ĉu vere la plimulto de la Esperantistaro nun preferas *-io* ol *-ujo* kiel landnoman sufikon. Pri la vorto *po*, kiu laŭ la aserto de Degenkamp "estas pli ĝuste adverbo ol prepozicio", oni povas opinii, ke pro ĝia malfacileco por Esperantistoj, kiuj ne havas egalan vorton en siaj naciaj lingvoj, kaj pro tio, ke ĝi ne estas nepre necesa elemento en la lingvo, estus plej bone permesi al ĝi mortigi.

La stilo de Degenkamp mem estas klara, gramatika kaj plej ofte laŭfundamenta. Li tamen uzas tiajn formojn, kiaj *rimarkeblas*, *malfacilas* kaj *menciindas*, formoj trafaj, oportunaj kaj tute klaraj, sed ĝis nun ne multe uzitaj. La esprimo *ne jam* (14,34) anstataŭ *ankoraŭ ne ĝenas* la leganton de tia verko. *Dum kiam* (12,29) pli bone estus *dum*. Anstataŭ la mallogika sed Zamenhofs *por ke* kun *u*-moda verbo, Degenkamp uzas (33,37,40) *ol ke* kun kondicionalo: *la problemo estas tro komplika, ol ke oni povus kontentige solvi ĝin*; oni skribu prefere: *la problemo estas tiel komplikita, ke oni ne povas kontentige solvi ĝin*.

Alec Venture.

\***Novaj Esperanto-Historietoj** de diversaj aŭtoroj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. 70 p. broŝ. 20×15 cm. Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

Participajn lecionojn bezonas preskaŭ ĉiuj Esperantistoj senescepte, sed ekster la Zamenhofaj verkoj estas malfacile trovi libron rekomendindan por tiu celo. Ĉi tiu libro do estas escepte bona, ĉar ĝi prezentas per 70 amuzaj kaj legindaj rakontetoj multajn ekzemplojn de la ĝusta participa uzo.

Eraroj participaj enestas nur du! *estis savataj* (p. 29) anst. *savita*, kaj *estus estinta fiasko* (p. 63) anst. *estis estonta*, aŭ simple *estus fiasko* laŭnuance. Duobligita akuzativo kiel ekzemple *straton havantan* . . . *belajn vilaojn* (p. 19) estas gramatike ĝusta, sed ĉiam evitenda en Esperanto—la klara lingvo.

Kontrolite de la Literatura Komitato de F.L.E., la libro estas iom pli altnivela ol ordinare, sed ankoraŭ restas kelkaj malbonaĵoj, precipe prepoziciaj. Kontraste, oni tute ĝuste uzis *de* en *proksime de* (p. 13). Plurloke mankas gravega komo: *Malespera la kelnero* (p. 7)=*la malespera kelnero* anst. *Malespera, la kelnero* . . . =*estante malespera, la kelnero* . . .

Verbfinajoj estas rimarkinde logikaj kun du-tri esceptoj, sed la stulta uzo de *-os* en senco de *-is* por rakontado (historietoj 7 kaj 69) estas neniel konvena al Esperanto.

Feliĉe S-ro MacPherson (historieto 26) estas fikcia, alie li eble mortpafus la verkinton pro la disrompiĝo de la nomo. Depreni *Mac* de Skota nomo estas riski militon !

Ne tre longaj—plejparte nur anekdotoj—la historietoj bone taŭgas por kursoj, kluboj kaj studrondoj. Ni ĉiuj humile studu tiujn participojn. Jen bela specimeno: *La sinjorino kompreneble konsterniĝis, vidante viron manĝanta herbon* (p. 20).

T. Pendlebury.

\***Esperanta Krestomatio**: komp. de H. A. de Hoog, Mr. A. J. Kalma, W. F. Kruit, Frato Wigbertus van Zon. Eldono: Nederland Centra Komitato Esperantista. Kartonita, 120 p. 13×9 cm. Prezo 4 ŝil. 6 pencoj, afranko 2p.

Jen tre kompetente kunmetita legolibro destinita por servi unualoke al kandidatoj por la elementa diploma, kaj samtempe taŭga por provizi interesan legaĵon ankaŭ al aliaj.

La libro enhavas entute 77 diversajn pecojn, kiuj estas plejparte prozaĵoj, sed kiuj inkluzivas ankaŭ poemojn originalajn de Zamenhof, Grabowski, Devjatnin kaj Baghy. Malgraŭ ke la prozaĵ pecoj estas verkitaĵ aŭ tradukitaĵ de aŭtoroj pioniraj kaj modernaj, la stilo ne impresas malegale. Multnombraj estas la simplaj anekdotoj, fabeloj kaj spritaj rakontoj; inter ili tamen troviĝas ankaŭ la tekstoj de la Zamenhofa parolado ĉe la unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo kaj de la letero *Pri la deveno de Esperanto*. La legaĵoj estas lerte elektitaj por amuzi kaj interesi la studenton, kaj krome donos al li la eblecon ensorbi kun tre abunda lingva materialo iom el la spirito kaj esenco de la Esperanta kulturo.

Redaktante la libron, oni celis disponigi materialon tute liberan je dubindaj kaj tute eraraj formoj, kaj tiucele oni ne hezitis fari ŝanĝojn en la originalaj tekstoj, eĉ en tiuj de Zamenhof kaj aliaj unuarangaj aŭtoroj. Konsidere la lingvan neperfektecon de *Fundamenta Krestomatio* (el kiu multaj tekstoj estas ĉi tie represitaj) kaj ankaŭ tion, ke la legantoj estos senspertaj pri la evoluo de la lingvo, oni devas konsenti, ke ĉi tiu procedo estis prudenta.

Lingvaj kritikindaĵoj en la libro estas malmultaj. *Nura* (20) devus esti *sola*; *miljaroj* (68,70) kvankam Zamenhofa kaj tradicie sankciita pro sia uzo en *La Espero*, oni devus korekti al *jarmiloj*; la formoj *ĝustis* (36) kaj *aŭdeblis* (40) ne estas tute taŭgaj en legolibro por elementaj studentoj. Kelkaj preseraroj estas troveblaj.

Alec Venture.

## ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

*Mallongigoj*: I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

|                 |                |                                                                                                                   |
|-----------------|----------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Ĉiutage</b>  | 16.30-16.45    | Praha. 1935m. kaj 25.34m. I.                                                                                      |
|                 | 22.00-22.15    | Praha. 31.41m. P.                                                                                                 |
| <b>Lundo</b>    | 11.30-11.40    | PRG2 (Brazilo). 104m. P.                                                                                          |
|                 | 20.50-21.00    | Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjooj, teatraĵ scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII. |
|                 | 22.30-22.35    | Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.                                           |
| <b>Mardo</b>    | 17.20-17.30    | Wien II. 31m. kaj 228.6m. I. Esperanto-Servo, Wien, Neutorgasse 9.                                                |
|                 | 17.45-17.50    | Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.                    |
|                 | 18.50-19.00    | Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.                                                                                     |
|                 | 21.45-22.00    | Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).                                                                       |
|                 | 22.00-22.10    | Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.                                                                   |
| <b>Merkredo</b> | 10.15-10.35    | Paris. 431.7m. K.                                                                                                 |
|                 | 21.10-21.25    | Warszawa III. 49.06m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszekowa 8.                                                       |
|                 | 22.30-22.35    | Budapest I (kiel je lundo).                                                                                       |
| <b>Ĵaŭdo</b>    | 5.35-5.45      | Wien I. 506.8m. I. germanlingva. Esperanto-Servo, Wien, Neutorgasse 9.                                            |
|                 | 17.45-17.50    | Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.                                                                      |
|                 | 18.45-19.00    | Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysílač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.                                        |
|                 | 21.50-22.00    | Praha. 470.2m. (kiel je lundo).                                                                                   |
|                 | 22.00-22.10    | Ostrava. 259m.                                                                                                    |
| <b>Vendredo</b> | 17.45-18.00    | Hilversum II. 415m. P. (nur je la 21a de Novembro). N.C.R.V., Sekcio Disaŭdigo, Postkesto 5, Hilversum.           |
|                 | 18.50-19.00    | Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.                                                                                     |
|                 | 22.30-22.35    | Budapest I (kiel je lundo).                                                                                       |
| <b>Sabato</b>   | 19.00-19.45(?) | PRA2 (Brazilo). P. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da República, Rio de Janeiro.                         |
|                 | 22.00-20.30    | PRI 3 (Brazilo). 49.75m. P. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.                 |

**Klarigoj**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo signifas ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuletojn kaj informojn pri ricevo.

## ENIGMA KONKURSO N-ro 21

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belĝujo

Solvoj de la enigmoj en Konkursio N-ro 19 :

**N-ro 43 :** (Aŭtoro de tiu enigmo estas S-ro T. K. Slade (Brit.). La klarigo "I.I Teksajo" devus esti "Teksjo". Oni enskribis a kredante ke estas skriberaro).

Horizontale oni legas : trikulinioj, aerolitero, ksentemaod, tenkanongo, oraenanars, avbrutopal, lienretofo, vespitemis, drpoidniki, overkantol.

**N-ro 44 :** Kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas. Ŝlosilvortoj : kompanio, industrio, uverturo, patrineco, respubliko, urbonomo, dinosaŭro, elefanto, neurga, triborda, ordinara, nedresita, nepostulema, egalanimeco, homevitulajo, aligato, vivisekio.

**N-ro 45 :** En la dua kazo estis  $12 \times 80 = 960$  malplenaj lokoj pli ol en la unua kazo. Tioj estis la diferenco inter la nombro da ĉeestintoj kaj la nombro da forrestintoj. Tiu diferenco egalas ankaŭ la kvaroblon de la nombro da forrestintoj. Forrestitoj de 960 :  $4 = 240$  kongresanoj, kaj ĉeestis  $5 \times 240 = 1200$  kongresanoj ; do vizitis la kongreson 1440 kongresanoj.

Gajnis la premion post kontrolo de la deksepa konkursio : S-ro A. E. Rosengard-Hansen (Dan.) 98p, S-ro P. E. Schwerin (Aŭstral.) 91p, S-ro A. H. v. d. Broek (Ned.) 89.5p.

**Enigmo N-ro 48 :** adi - ado - ajo - amo - ant - ant - avi - cen - coj - dif - dio - eco - eco - eco - egr - ela - ele - eli - elo - ema - end - ero - erv - est - gif - gio - her - ika - iko - ins - ito - ito - kon - kot - ktr - maj - met - nar - nci - nek - neo - nos - nov - nur - obs - ofe - ogo - ono - ono - ope - opo - ort - osk - per - pis - ran - rem - rol - sak - sof - sto - sto - tal - tal - tar - tar - tel - ter - tra - ulo - umb - unu.

El la ĉi-supraj 72 litergrupoj oni povas formi 24 naŭliterajn vortojn. La unuaj literoj kaj poste la kvinaj literoj formas frazon, kiun mi trovis en N-ro 1 de la militeldono de *Heroldo* (de la lasta vorto nur la unua litero).

Jen la signifoj de la vortoj en la ĝusta sinsekvo : 1. drogo, 2. medicina instrumento, 3. prozverkisto, 4. meblaĵo, 5. unikeco, 6. membrano, entenanta la intestojn, 7. boaco, 8. plantofamilio, 9. gorga malsano, 10. liberigis, 11. biografio, 12. danco, 13. flugisto, 14. perfekte fermita, 15. sindonemeco, 16. imponeco, 17. kuracarto, 18. samcentra, 19. rigardado, 20. melankolio, 21. araneo, 22. atomero, 23. muzikilo, 24. depeŝo.

**Enigmo N-ro 49 :** Ĉi-sube sekvas citaĵo el kongresparolado de D-ro Zamenhof. Bedaŭrinde

ĉiuj vokaloj perdis. Vi bonvolu retrovi ilin kaj sendi al mi la kompletan tekston.

N knstnt rptds, k n tt n dzrs nn nmks n l ntrnn vvn d l gntj, sd n dzrs nr kr lgnn pntn ntr l gntj. L dvz d l dj sprntstj, nmm ĝs nn prez frmlt, sd ĉm klr snnt, sts : "N dzrs kr ntrln fndmntn, sr k l dvrsj hmj gntj pvs pc kj frt ntrkmnkĝd, n ltrdnt l s sjn gntjn prtjnn." T, l m pn, sts l dvz d l vrd stndrd, d t bl kj mjst stndrd, k knvks nn ĉjr l ĉj prtj d l mnd n l nm d l plj bl rv d l hmr.

El kiu kongresparolado mi prenis ĉi tiujn alineojn ?

## KIE ESTAS KIU?

### Servo de reserĉado de UEA

Regule alvenas informoj pri samideanoj ekzilitaj kaj forpeltitaj, kiuj siavice serĉas parencojn, amikojn, kaj atendas konsilon-konsolon. Temas unuavice pri Germanoj el regionoj iam loĝitaj de Germanoj de Ĉeĥoslovakujo, plie de Silezio, Orienta Prusujo, Pomeranio, k.a., kaj en Germanujo mem troviĝas centmiloj da dislokitaj personoj aŭ D.P. ĉiĉalantaj. Inter ili estas nombro da Esperantistoj, kiujn nia servo de interhelpo penadas provizi per materialo. Pro manko de loko ni de nun komunikos nur nomojn de aktivaj samideanoj, estintaj delegitoj, kursvidantoj, k.s.

### Oka listo

- Bär, Erich, revenis el militkaptiteco, (10b) Oelsnitz i. Erzgebirge, Lugauerstrasse 43, S.Z.  
 Baumgart, Artur, Del. en Landeshut, (10a) Bautzen, Sa. Goethestrasse 12, S.Z.  
 Eden, Bernhard, Del. en Wilhelmshaven, (23) Wilhelmshaven, Halligenweg 12, B.Z.  
 Feigenbutz, S-ino E., Del. en Karlsruhe, (17) Sinzheim, Elsenz, Baden, Hagmaierplatz, A.Z.  
 Gulbis, Janis, el Riga, Latvian D.P. Camp, Block 2, St. 10, Hanau a. Main, A.Z.  
 Hoppe, Richard, Del. en Wohrlau, Sil., (13a) Scherneck über Coburg, Bayern, A.Z.  
 Hoppe, Walter, VD en Oppeln, Berlin-Tempelhof, Bacheracherstrasse 38a.  
 Klein, Emil F., Del. en Schönpriesen, ĈSR., (10b) Freiberg i. Sachsen, Turmhofstrasse, S.Z.  
 Klotz, Erich, el Königsberg i. Pr., (10) Leipzig W. 35, Georg Schwarz Str. 164, S.Z.  
 Lobkowitz v., A., el ĈSR., (13b) Bad Tölz i. Bayern, Dietramszellerstr. 8, A.Z.  
 Mebs, Hans, revenis el militkaptiteco, (17a) Mannheim, Baden, Luisenring 60, A.Z.  
 Raabe, Reinhold, el Breslau, (24) Hamburg 34, Weddestr. Plattenhaus 13, B.Z.  
 Weiss, Rudolf, Del. en Duchcov ĈSR., (19) Schönewalde, Markt 6 über Herzberg Elster, S.Z.  
 Zyleit, Fritz, el Tilsit, (23) Bexhövede über Wesermünde, N. Sa., B.Z.  
*Mallongigoj :* A.Z.=Amerikana Zono ; B.Z.=Brita Zono ; F.Z.=Franca Zono ; S.Z.=Sovjeta Zono.

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 199

6an de Oktobro, 1947

## NOVAJ DELEGITOJ

La sekvantaj enskriboj estas faritaj post la pretigo de la Dua Parto de la jarlibro, nun presata.

### Britujo

**Stratford-on-Avon.** D : Pastro H. O. Mason, Quinton Vicarage. Tel : Pebworth 249.

### Finnlando

**Jokioinen.** D : S-ino L. Kahivaara, Säästöpankki.

**Loppi.** D : S-ino H. Peltonen, Riihimäki, Topeno. Tel : Topeno 26.

**Pudasjärvi.** FD (Jurnalismo) : Martti Putaala, Siurua.

### Germanujo

**Driedorf.** D : K. Karger, EKO-Centro, Heisterbergerweg, (16) Driedorf/Dillkr., Hessen.

**Duisburg.** FD (Komercklamado) : W. Reinhold, Johannerstr. 84, (22a) Duisburg. Tel : 31200.

**München.** FD (Go-ludo : Lingvoj) : E. Hertlein, Auenstr. 78/III, (13b) München 5.

**Oberstdorf.** D : H. Wagner, Hs. Edelraute, Prinzenstr., (13b) Oberstdorf i. Allgäu.

## ŜANĜOJ

### Britujo

**London.** FD (Kremacio) : nova adreso : 36 Lupus St., Westminster, S.W.1.

## Finnlando

**Heinävesi.** D : vakas.

**Oulu.** FD (Jurnalismo) : vakas.

**Tampere-Märmälä.** D : nova adreso : Mikonkatu 16.

## MEMBRO-SUTENANTOJ 1947

293. S-ro K. Karger, Driedorf, Germanujo.

294. S-ro G. A. Brown, Cubatao, Brazilo.

**DONACOJ**—R. Brinkmann 48., Gen. L. Bastien £13-16-5.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

## STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 30a de Septembro 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Septembro 1946 :

|                      | 1946  | 1947  |
|----------------------|-------|-------|
| Asociaj membroj ..   | 7381  | 7107  |
| Individuaj membroj : |       |       |
| MJ ..                | 1092  | 1090  |
| MA ..                | 4142  | 5240  |
| MS ..                | 251   | 291   |
| Patronoj ..          | 24    | 22    |
| DM ..                | 99    | 150   |
| HM ..                | 21    | 53    |
|                      | 5629  | 6846  |
|                      | 13010 | 13953 |

CECIL C. GOLDSMITH, Sekretario.

## ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

La 32-a Universala Kongreso unuanime aprobis la planon de D-ro Székely, ke instataŭ sporadaj propagandadoj komenciĝu laŭplana tutmonda propagando. Tial U.E.A. faras konstantan rubrikon en sia gazeto kaj petas ĉiujn samideanojn atenti la donatajn konsilojn.

(1) **Fakdelegitoj pri propagando.** En ĉiu urbo kiu havas minimume 100.000 enloĝantojn devus esti tia fakdelegito. Ankaŭ en malpli grandaj urboj samideanoj povas sin anonci por tia laboro. Anoncu vin !

(2) **Samideanoj de la Danubvalaj ŝtatoj** decidis aranĝi propagandan semajnon ĉiujare dum la unua semajno de Oktobro. Estas dezirinde, ke aliaj landoj simile agu. Zorgu, ke tiutempe ĉiu Esperantisto portu insignon. Aperigu artikolojn en la nacilingva gazetaro kaj faru priesperantajn prelegojn ĉie.

(3) **Franca samideano** sukcesis akiri la subskribon de la ŝtatprezidanto, S-ro Vincent Auriol, por la Petskribo. Samideanoj en ĉiuj ĉefurboj tuj preparolu rimedojn akiri similajn subskribojn, de ŝtatestro kaj anoj de la registaro.

(4) **Fakdelegitoj** por Propagando prilaboru planojn por landa aŭ loka agado kaj sendu ekzempleron al la redaktoro.

Jen la unuaj taskoj. Ekagu !

## ONI ALVOKAS !

*Alvokoj kun ĝenerala karaktero kaj sen komerca celo estas akceptataj senpage, kondiĉe ke ili estu tre mallongaj. Tro longajn ni mallongigos. Alvokoj kun komerca karaktero povas aperi nur kontraŭ pago, en la Anonca Fakoj, kiel pagita reklamo.*

**Slovakujo,** la orienta parto de Ĉeĥoslovaka respubliko, estas riĉa je naturaj belaĵoj. Por interesi turistojn la Klubo de Slovakaj Turistoj kaj Skiistoj aperigis en Turĉ. Sv. Martin riĉe ilustritan luksan ĉiemonatan revuon *Belaĵoj de Slovakujo*. En ĝi aperas Esperantaj resumoj. Se oni ne volas aboni, almenaŭ sendu dankleteron al redakcio, *Krásy Slovenska*, Kuzmánystrato 19, Turĉ. Sv. Martin, Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

**En Hannover** 31-an de Aŭgusto oni fondis *Kolektivon de junaj Esperantistoj el la Brita zono* (KoJe). Tiu organizaĵo deziras interkontakti kaj kunlabori kun la Esperantista junlar-movadoj tra la tuta mondo. Skribu al : Friedel Bues, Friedrich Eberstr. 9, HANNOVER, Ricklingen, Germanujo.

**Por montri la utilon** de Esperanto S-ino Erika Linz volas kontakti samideanojn en la tuta mondo por kompilo de receptoj de naciaj manĝaĵoj. Precipe samideaninojn oni invitas je kunlaboro. Skribu : Erika Linz, CARAGUATATUBA, Estado de Sao Paulo, Brazilo. Represigu en naciaj Esperanto-gazetoj.

**Don Kifoto de la Manĉo**, literatura ĉefverko hispana, en ĉiuspecaj eldonoj fremdlingvaj, ankaŭ en ĝisnunaj esperantaj fragmentoj, aĉete dezirata. Ankaŭ esperanta hispana literaturo ĝenerale kaj speciale. Ĉe hispanoj oni pereblus la UEA-membro-kotizon. Ofertoj kaj havig-kondiĉoj al UEA-Peranto, D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

**20-jara germana Esperantisto** deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Karl Ernst Münzer, Töpferstr. 15, Worms, Franca Zono, Germanujo.

**Tutmonda Katolika Adresaro**, 1948. Tria jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, koresponddeziroj—du internaciaj respondkuponoj (kun senpaga ekzemplero de la adresaro). Limdato 15 Decembro. Aperos la Januaro. Prezo de 1947a eldono: 2 int. rpk. OhUiginn, Bóthar Glasárd 16, Dublin, Irlando.

**Propagandcele** bonvolu sendi esperantajn kaj naci-lingvajn gazetojn, revuojn, k.t.p. el ĉiuj landoj. Cl. Piron, 30 Bruselstr., Namur, Belgujo.

**Luis Vicino**, Maza 1450, Baires, Argentino, interŝanĝas neuzitajn rememoran poŝtmarkojn en kompletaj serioj, laŭ oficiala kurzo; ankaŭ uzitajn.

**S-ro Jan Feitsma**, 23-jara, deziras korespondi. Adreso: Hotel "De Gouden Leeuw", Bergen op Zoom, Nederlando.

**Helpu nian propagandon**, Sutton Esperanta Klubo. Bonvole sendu ĉion, kio utilos por tutvintra Esperanta ekspozicio en fenestro en ĉefstrato en Sutton. Kvitanco ni respondos kaj dankos. E. Lewis, 3 Ashdown Road, Epsom, Surrey, Anglujo.

**17-jara studento** deziras korespondi kun tuta mondo. Kolektas ilustritajn poŝtkartojn. Antonin Lecián, Veselí nad Moravou 982, Ĉeĥoslovakujo.

**Gramofondiskojn** volas aĉeti aŭ interŝanĝi s-ro Jaromír Pavlacký, Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

**20-jara Hungara fraŭlino** deziras korespondadi tutmonde. Gizella Köszegfalvy, Kassa-utca 1, Hódmezővásárhely, Hungarujo.

**Paul Den**, 45 De Lisle Road, Bournemouth, Anglujo, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj, aŭ sendos pk. kontraŭ pm.

**Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn** kun ĉiuj landoj: Francis Vals, Rue Verdun, Carcassonne, Francujo.

**Mi interŝanĝas pm.** kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Pierre Bruquerel, 74 rue de Verdun, Bagneux (Seine), Francujo.

**Kontraŭ 25 aŭ 50 poŝtmarkoj** el via lando mi sendos egalan kvanton da francaj. Garantiata respondo. S-ino R. Raffy, 63 rue Violet, Paris 5, Francujo.

**Kontraŭ bele filatele** afrankitaj p.i. kaj kovertoj mi nepre sammaniere respondos. S-ro Romain Chambaz, 44 rue du Haut-Pavé, Etampes (S. et O.), Francujo.

**21-jara armea oficiro** deziras korespondi tutmonde. Leonard Cohen, 6 Hendon Park Mansions, London, N.W.4, Anglujo.

**Liceanoj** deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn. kun junaj geesperantistoj. Skribu al S-ro Thiollot, 103 Rue Saint-Jacques, Angers, Francujo.

## NI SEMAS KAJ SEMAS KONSTANTE...

Antaŭ kelke da monatoj nia Internacia Sekretario, S-ino M. De Rycke, dissendis cirkuleron al ĉiuj Fakdelegitoj por Filatelo kaj alvokis ilin al kunlaboro por plisolidigi la movadon *Esperanto per Filatelo*.

Tiutempe nia Asocio nur ĵus faris komencon. Hodiaŭ ni havas 780 membrojn, inkluzive de eminentaj filatel-istoj en pluraj landoj. Ni denove invitas samfakanojn aliĝi al ni por ke ni povu venontjare aranĝi fortan kaj impresan demonstracion en Malmö.

Ni volas emfazi, ke duono de niaj membroj ankoraŭ ne estas Esperantistoj, kaj ni ĉiutage varbas novajn al kiuj ni prezentas ESPERANTON EN LA PRAKTIKO. Ni ne volas maltrafi kiun ajn okazon emfazi por niaj samideanoj ke ni **ne** kolektas poŝtmarkojn, sed ni **kolektas kolektantojn**—por Esperanto. I.A.P.K. faras kaj faros ĉion kion ĝi povas, sed ĝi urĝe bezonas la materian apogon de la Esperantistoj por pruvi al la skeptikuloj kaj neamikoj, ke la lingvo ja havas praktikan valoron.

Jen utilaj rimedoj por helpi nin: aliĝu al I.A.P.K.; abonu nian revuon *Universala Poŝtmarka Revuo*; kaj aĉetu nian Internacian Katalogon—la unuan en Esperanto—kiu traktas ĉiujn poŝtmarkojn de Britujo. Niaj eldonaĵoj mem estas valoraj propagandiloj.

Ĉiujn informojn pri nia agado oni povas ricevi kontraŭ internacia respondkuponon aŭ samvalora freŝa poŝtmarko de sia lando de INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ, XPDO House, DIDCOT, Berks., Anglujo. (*Reklamo*).



## ESPERANTO

*portanto de la  
mondpaco!*

Jenan kaj aliajn efikplenajn

## E-varbstampilojn

vi ricevas en ĉiu dezirata lingvo!

Prezo: 4 ŝil. aŭ 16 rpk. inkluzive afranko

*Mendu ĉe*

## Waldemar Reinhold

Esperanto-Varbiloj

Johanniterstr. 84

(22a) Duisburg (Germanio)

*Vian pagon direktu al UEA!*

Ĉu vi komprenas kiel

## ISLAMAJ DOKTRINOJ SIMILAS AL ZAMENHOFAJ ?

aŭ kial Eŭropanoj fariĝas Islamanoj? SE NE,  
vi neniam legis la verketon tiel laŭde recenzitan  
en la Esperantista gazetaro:

## ISLAMO ESPERANTISTE RIGARDATA

(Originale verkis COLIN EVANS)

10 pencoj, aŭ 3 respondkuponoj internaciaj

IKRO (Islama Korespondanta Rondo)

10 St. Philips Place, London, W.2, Anglujo

Se en via lando estas tute neeble pagi, petu  
senpagan ekzempleron—sed tiuokaze kial ne  
donacu libere vialandajn poŝtmarkojn, neuzitajn,  
ĝis valoro de unu ŝilingo angla, al IKRO?

Mendebla ankaŭ ĉe U.E.A.

(sed nur kontraŭ pago aŭ rpk.)

## LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn  
kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de  
Esperanto.*

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta; la  
lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto  
pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga,  
kiun mi ĝis nun legis en Esperanto... la  
frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj  
ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la  
bezonatan nuancon... La rezulto estas libro  
pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por  
la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla..."—  
*Esperanto Internacia.*

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,

tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,  
afranko 9p.

Mendu ĉe U.E.A.

Abonu

## RIO ESPERANTISTA-n

Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro,  
Brazilo

*Direktas:* NELSON DE SOUZA

*Redaktas:* LASZLÓ ZINNER

**Jarabono:** 25 respondkuponoj

Provekezemplero kontraŭ 1 rpk.

DENOVE HAVEBLA

★

## LA NEKONATA KONATO

Mistera rakonto originale verkita de  
DOUGLAS P. BOATMAN

120 paĝoj, bind. 5 ŝil., afranko 4p.

Mendu ĉe U.E.A.